



JARO 1.<sup>a</sup>

JANUARO DE 1910

NUM. 1.<sup>a</sup>

**ENHAVO**

Saluto. — Doktoro L. L. Zamenhof. — Ĝi estis bezona — Andaluziaj moroj:  
La Gajumbo. — Kroniko. — Spritaĵo. — Anoncoj.



# ◉ Gazeto Andaluza ◉

## SALUTO

Aperante de la esperanta mondo, kiel organo de la grupoj fonditaj ĝis nun en la Kadiz'a regiono, nia unua saluto devas esti por la eminenta elpensinto de Esperanto kaj por la esperanta gazetaro, kun kiuj ni dividis de nun niajn propagandajn kaj vulgarigantajn taskojn, batalante kvazaŭ vicsoldato, pro la belega idealo, kiu nin kuraĝigas, kaj kiun ni tre baldaŭ vidos ofektiviĝinta. Al ĉiuj, ni sendas, de tiuj ĉi literkolonoj, humilansed koran atenton de aliĝo kaj respekto.

LA REDAKCIO.

## SALUDO

Al aparecer en el mundo esperantista, como órgano de los grupos constituidos hasta hoy en la región gaditana, nuestro primer saludo debe ser para el eminente inventor del Esperanto y para la Prensa esperantista; con quienes compartiremos desde ahora las tareas de propaganda y vulgarización, luchando, como soldado de fila, por el hermoso ideal que nos anima y que muy pronto veremos realizado.

A todos enviamos desde estas columnas, un humilde pero cordial testimonio de adhesión y de respeto.

La Redacción.

## Dr.° L. L. Zamenhof

Rememoro de la 50<sup>a</sup> jaro de la naskiĝotago de la aŭtoro de Esperanto (2.<sup>a</sup>) 15<sup>a</sup> de Decembro de 1849-1909.

En sia modesta kuracista loĝejo, en Varsovio, la genia aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto, Dr.° Lazaro Ludoviko Zamenhof, la lastan 15<sup>a</sup> de Decembro ricevis nekalkuleblajn telegramojn kaj salutleterojn de siaj miloj da anoj. La plej parto el la preskaŭ 1800 grupoj esperantistaj solene festis la



## RECUERDO

del 50.º año del nacimiento del autor de Esperanto. (\*)

15 Diciembre 1849-1909

En su modesta clínica, en Varsovia, el genial autor de la lengua internacional Esperanto, Dr. Lázaro Luis Zamenhof el 15 de Diciembre último ha recibido incalculables telegramas y cartas de salutación de sus miles de partidarios. La mayor parte de los casi

1.800 grupos esperantistas han festejado

(\*) Según el Calendario Juliano, de estilo antiguo.

## Gazeto Andaluzia

50<sup>ma</sup> de la naskiĝotago de la Majstro. Tiu ĉi tago estis tutmonda okazintaĵo por tiuj rondoj kiuj gloras en Doktoro Zamenhof la scienculon eltrovintan fine la solvon de internacia lingva problemo, kaj kiuj honoras lin pro lia eminenta talento kaj granda modesteco. Al la gloraj laŭroj, la Esperantanoj aldonis kronon de sincera amo.

Ni deziras al li hodiaŭ, ke li ĝu tute sana la fruktojn de sia nemortebla faritaĝo, ĝis kiam li povos ĉeesti la proksiman venkon de la internacia lingvo: kiam ĝi estos akceptata *ofice*, de la Registaroj, kaj kondukata en la diverslandajn edukkejojn.

### Ghi estis bezona

Oni diris prave ke poetoj estas same kiel divenistoj, kaj ĉe etimologie ambaŭ vortoj havas en latina lingvo saman devenon; ne estas, do, mirinde, ke nia glora majstro D<sup>o</sup> Zamenhof, elpensinto de Esperanto kaj rimarkinda poeto, antaŭdiris ĉe «La Vojo» la triumfon definitivan de nia kara idioma, sed «paŝo post paŝo post longa laboro» tial plenumiĝas lia antaŭdiro: malrapide, iom post iom, ĉar tiamaniere ĉiuj sp kaj akiraĵoj fortikiĝas.

Rilate al nia lando, longan paŝon estos faronta Esperanto per la apero de la simpatia gazeto, por kiu tiuj ĉi sensignifaj linioj estas skribitaj.

La bela kaj klera Andaluzia regiono, tiel fruktodona kampare,

tejado solempnemente el quincuagésimo aniversario del día del nacimiento del maestro. Este día ha sido un acontecimiento universal para aquellos círculos que glorifican en el Dr. Zamenhof al hombre de ciencia, que ha encontrado finalmente la solución del problema de una lengua internacional y que le honran por su eminente talento y gran modestia. A los laureles de la gloria los adeptos del Esperanto han añadido la corona de sincero amor.

Nosotros le deseamos hoy, que goce en plena salud los frutos de su fraternal é inmortal obra, hasta que pueda presenciar el próximo triunfo de la lengua internacional; cuando ésta sea aceptada oficialmente por los Gobiernos é introducida en los Centros de enseñanza de los diversos países.

### ERA NECESARIO

Se ha dicho con razón que los poetas tienen mucho de adivinos y hasta etimológicamente ambas palabras tienen en latín igual origen, no es, pues, de extrañar, que nuestro ilustre Maestro el Doctor Zamenhof, inventor del Esperanto é insigne poeta, predijera en *La Vojo* el triunfo definitivo de nuestro querido idioma; pero *pasó tras paso*, después de *larga labor*; y así se va cumpliendo su vaticinio, despacio, poco á poco, que de este modo es como las conquistas de toda especie se consolidan.

Por lo que hace á nuestro país, un gran paso habrá de dar el Esperanto con la aparición del simpáti-

## Gaceto Andaluzia

kiel intelekto, bezonis de antaŭlonge esperantan gazeton divastigantan la bonan semon de nia belsona lingvo. Pro ĝia sido en Hispanujo kaj pro ĝia signifo rilate al eksterlando, kie prave estas rigardata kvazaŭ la plej hispana el hispanujo, ni devas antaŭ ĉio stimuli ĉi Andaluzio la esperantistan propagandon. Post esperantigo de Katalanujo, Valencio, Andaluzio kaj Galizio, la cetera de Hispanlando estos nepre esperantigita.

Plie, Andaluzio estas unu el niaj regionoj per kiu pli multe nia lando estas konata en eksterlando. Ĉi nekomparebla klimato, ĝiaj floroj, ĝiaj pentrindaj moroj, ĝiaj monumentoj, ĝiaj virinoj kaj poetoj, ĉio meritas esti konata de la tuta mondo: ĉio simboligas nian patrujon, al kiu Andaluzio liveras plej karakterizitajn notojn kaj helajn nuancojn.

Bedaŭrinde, trans la landlimoj aliris ĉiam falsa impresoj pri nia kara Hispanujo. La eksteruloj ordinare ĝin vidas tra tiaj aliĝantaj vitraĵoj, kiuj kriplas la bildon. Tiamaniere iuj verkistoj priskribis nian landon tiel malvere kaj mal-

na rekonocierlo. De ahi la surpriso de los extranjeros cuando vienen a vivir entre nosotros, pues no encuentran en nuestra vida real las fantasías escritas por autores hispanófilos. (!)

Todo ello tiene grave trascendencia en cuanto al juicio formado

co periódico para el cual se trazan estas insignificantes líneas.

La bella y culta región andaluza, tan fecunda por su suelo como intelectualmente, necesitaba hace tiempo un periódico esperantista que extendiera la buena semilla de nuestra sonora lengua. Por su situación en España y por su significación en el extranjero, donde con razón es considerada como lo más español de España, debemos ante todo excitar en Andalucía la propaganda esperantista. Esperantizadas Cataluña, Valencia, Andalucía y Galicia, el resto de España tiene que ser esperantista forzosamente.

Además, Andalucía es una de nuestras regiones por la que más se conoce a nuestro país en el extranjero. Su clima incomparable, sus flores, sus pintorescas costumbres, sus monumentos, sus mujeres y poetas, todo merece ser conocido en todo el mundo, todo simboliza nuestra patria, a la que Andalucía presta sus más características notas y bellos matices.

Por desgracia al otro lado de las fronteras llega siempre una falsa impresión de nuestra querida España. Los extraños la ven ordinariamente, a través de esos engañosos cristales que deforman la imagen. De esa manera, algunos escritores describen nuestro país tan inexacta-

Eneniu per niaj raportoj rekonos ĝin. El tio la surprizo de eksterlandanoj kiam ili venas loĝadi inter ni, car ili ne trovas en nia reala vivo la fantaziaĵojn verkitaĵoj de aŭtoroj «hispanŝatantoj» (!).

## Gazeto Andauzija

Ĉio tio havas gravan trascendecon rilate al farita aŭ farota recenzo pri ni en Eŭropo, pri kiu juĝo ni eksentis ĵusaj tre maldolĉaj pruvoj.

Kun profunda senco nia kara Doktoro parolas nin, en «La Espero» pri centjara, muroj apartigantaj la popolojn. Vere, ne ekzistas interbaroj kompareblaj al la diversseco de lingvoj. La tutmonda gazetaro raportos ĉiutage la diversnacionan historion, sed nur estas afero pri historio, kiun ĉiulando rakontas sole al si mem, ne preterpasante la landlimon eĉ unu eĉo, ĉar transe apenaŭ ekzistas kelkaj deklaroj da personoj kapablaj por kompreni la lingvon de siaj najbaroj. El tio devenas ilia reciproka nekonado, ĉar ili restas tute malproksimigitaj unuj de la aliaj, pro malsameco de lingvoj.

Grava afero estas do por ĉiuj amantaj sian patrujon labori per tutaj fortoj al divastigo de nia vera kulturo, moroj kaj signifo de Hispanujo en la mondo; estas necese kontraŭmeti opiniojn al opinioj, librojn al libroj, malgraŭ ke ili estos kiel tiuj de Gautier kaj similaj, kiuj kvankam kun favorigemoj, ĉiam estas almenaŭ malĝustaj.

Ni ĉion sukcesos per Esperanto. Andaluzio, Meko de verkistoj kaj artistoj, niaj ordinara vizitantoj, estas taŭga regiono, kiun ni preferas devas esperantigi. Jen la kia-

o por formar en Eŭropa respecto de nosotros, acerca de cuyo juicio amargas y recientes pruebas hemos experimentado.

¡Con profundo sentido nuestro, querido Doctor, nos habla en *La Espero* de los muros seculares que dividen a los pueblos! Verdaderamente no existen murallas comparables a la diversidad de lenguas. La prensa universal relata a diario la historia de las diversas naciones, pero se trata solo de una historia que cada país solo se cuenta a sí mismo; pues al otro lado de sus fronteras, apenas existen algunas docenas de personas capaces de comprender la lengua de sus vecinos. De eso proviene su mútuo desconocimiento, puesto que ellos quedan del todo alejados unos de otros, por la diversidad de lenguas.

Asunto importante, es, pues, para todos cuantos amen a su patria trabajar con todas sus fuerzas para la difusión de nuestra verdadera cultura, costumbres y significación de España en el mundo; es necesario oponer opiniones a opiniones, libros a libros, aunque sean como los de Gautier y parecidos, que no obstante sus inclinaciones favorables, siempre son por lo menos inexactos.

Todo lo conseguiremos con el Esperanto Andalucía, meca de literatos y artistas, nuestros ordinarios visitantes, es región bien a propósito, que con preferencia debemos esperantizar. Hé aquí el porqué no se ha podido imaginar mejor cosa que la creación de GAZETO ANDALUZIA. Esta inspirada iniciativa, es digna del más ardiente aplauso y nuestro deber es trabajar con energía por su sostenimiento.

## Gazeto 'Andaluzia

lo pro kio oni ne povis imagi plej bonan aferon ol la kreo de GAZETO ANDALUZIA, tia verva iniciativo estas inda je la plej varma aplaŭdado, kaj nia devo estas klopodi energie al ĝia subteno.

Por tiu nova gazeto, kun- kun la aliaj, Hispanujo jam havas brilajn prezentadon inter la tutmonda esperanta gazetaro. Ĉu per niaj gazetoj ni atingos solenigi baldaŭ nacian kongreson? ¡Estu tiele! Multe profitus la afe on esperantistan ĝia solenigo.

Ĉiokaze, ni salutu varmege la naskiĝintan GAZETO ANDALUZIA el kiu ni, esperantistoj hispanaj, multe esperas; ĝi longedaŭre vivadu!

Tian ĉi fojon, la lumo venas el la Sudo.

E. CANO.

## Andaluziaj Moroj

### LA CAJUMBO

Ekzistas kaj ankoraŭ ekzistos longe, ĉe Andaluzio, moro bezonega en ĉiu popola festo, nomita GAJUMBO; tio estas, mallibera bovoviro kuranta tra la stratoj alligita per longa ŝnurego, je kiu tiras kelkaj junuloj, farante kun la besto laŭ ilia kaprico.

Kiam la festo estas anoncata por publika laŭdo la juna personaro apenaŭ aŭdas la voĉon de la anoncisto forlasas tion, kion ili estas farantaj, kaj kuras rapide al la fenest-

Con este nuevo periódico, unido á los demás de España, ya tiene lucida representación entre la prensa esperantista universal.

¿Conseguiremos pronto con nuestros periódicos solemnizar un congreso nacional? ¡Así sea! Mucho serviría á la causa esperantista.

En todo caso, saludemos con entusiasmo el nacimiento GAZETO ANDALUZIA, del que los esperantistas españoles mucho esperamos; ¡viva largos años!

Esta vez, la luz viene del Sur.

E. CANO

### Costumbres Andaluzas

## EL GAYUMBO

Existe y existirá todavía largamente, en Andalucía, una costumbre indispensable en toda fiesta popular, llamada «Gayumbo»; esto es un toro sujeto que corre á través de las calles amarrado con una larga cuerda, de la que tiran algunos jóvenes, haciendo con el animal según su capricho.

Cuando la fiesta es anunciada por medio de un pregón, los jóvenes apenas oyen la voz del anunciante abandonan cuanto están haciendo y corren rápidamente á la ventana ó al portal para no perder una sílaba delregonero. ¡Qué alegría! ¡Qué felicidad! Pareceles como mentira el futuro supremo momento. ¿Ha visto alguien al toro? Irremisiblemente, es un toro de plaza; suficientemente bravo para perseguir durante todo el día. Es un

## Gazeto Andaluzia

tro aŭ al la portiko, por ne perdi silabon de la publikigisto. Kia gajeco! Kia feliĉeco! Ĝajnas al ili kiel ne vera la venonta superega momento. Ĉu iu vidis jam la bovoviron? Nepre, ĝi estas taŭro; sufiĉe brava por persekuti dum la tuta tago. Ĝi estas bona subjekto: la urbestro tiel garantias ĝin. Granda. kiel kastelo, fiero kiel leono, sed «nobla», armitaj per akraj kornoj, kaj peza; kvankam ne tiel grasa kiel por lacigi ĝin pro la longa kurado.

Fine, la tago alvenas: ĉe la stratoj de la Vilaĝo elbordigas popolamaso; sed tuj kiam sonas la alarma voĉo «jen estas la bovoviro», disigas la popolo, kvazaŭ per ensorĉo. La bovoviro eniras la lokon venkigante tion, kio al ĝi kontraŭstaras kaj, krom tio, eĉ tiuj de la ŝnurego estas kiel lavango, pli terura ol la bovoviro mem.

La ŝnurego iĝas subite malstreĉa; haltas la besto, kaj eliras sur la pavimon kuraĝa junulo, okaza toreadoro, kiu malfermas kapoton antaŭ ĝi. Atakegas la bovoviro, tiel furioze, kiel la junulo «prenas la olivarbon», suprenirante sin sur fenestro: sed la timo ne lasas lin kalkuli, ke poste, tiu fenestro estas «amindaj» junulinoj, kiuj, per longaj kaj akraj kudrilegoj, «karesas» liajn tibikarnojn... Kiom da suferantoj estas portitaj en hospitalon, pro korna vundo kaŭzita de la pik-

buen sujeto: el alcalde lo garantiza. Grande, como un castillo, fiero, como un león, pero *noble*; armado con cuernos afilados, y de peso; aunque no tan gordo como para fatigarse por la larga carrera.

Por último, el día llega: en las calles de la aldea se desborda la multitud; pero cuando suena la voz de alarma *aquí está el toro*, el pueblo desaparece como por encanto. El toro entra en el lugar arrollando todo cuanto se le pone por delante y aparte de esto, hasta los de la cuerda son como una avalancha, más terrible que el toro mismo.

La cuerda se afloja súbitamente; párase el animal y sale al arroyo un valiente joven, torero de ocasión, que abre el capote ante él. Embiste el toro, tan furiosamente que el joven *toma el olivo*, subiéndose a una ventana; pero el miedo no le deja calcular que detrás de esa ventana están unas *amables* jóvenes, que con largas y agudas agujetas, *acarician* sus pantorrillas.

¡Cuántos heridos han sido llevados al hospital, á causa de una cornada ocasionada por los pinchazos. Sin embargo, la fiesta continúa, mientras el toro tiene fuerzas para recorrer toda la aldea; y cuando vuelve al corral de donde salió, está demasiado cansado, entrando a sus atormentadores, cojeando, mirando tristemente á uno y

vundetoj! Tamen, la festo daŭras, dum la bovoviro havas forton por rekuri la tutan Vilagon; kaj kiam ĝi reveras en la kelon el kiu ĝi eliris, ĝi estas tro lacigita, donante sin al siaj turmentoj, lamante, rigardante malgaje al unu kaj alia flanko, la ŝuuregon sur sia dorso, «dezirante morti por ripozi». Kiel ĉiujn heroojn, kiam ili alvenas al la morala ruino, oni nuligas ĝin; pro tio ke ĝia glora aŭreolo estas nekunigebla kun ĝia malfeliĉeco, kaj la popola fantazio ne povas suferi tian elreviĝon.

J. GARZÓN.

### Kroniko

«Espero Kataluna» elektis le jenan novan Direktan Komitaton: Prezidanto, Mikaelo Cases; Viceprezidanto Karlo Urbez; Sekretario, Henriko Ribera; Vic-sekretario, Josefo Astell, Kasisto, Baldomero Anglada; Bibliotekisto, Valenteno Renom; Voĉdonantoj, *Frluo* K. Saltiveri; Johano Berenguer kaj Klaudio Bravo.

La «Sociedad Obrera Tradicionalista», (Societo Laborista Tradicia) «La Margarita», Salmerón, 27 Gracia (Barcelona), fondis «Esperantan Katolikajn Grupon»

En Gerona'oj fariĝis grupo, sub la nomo «Amo kaj Espero. Aŭkaŭ fariĝis grupo en La Arboleda (Bilbao.)

La esperanta Grupo de S. Fer-

otro lado, la cuerda sobre su lomo, deseando *morir para descansar*. Como á todos los héroes, que llegan á la ruina moral, se le anula; porque su aureo'a de gloria es incompatible con su infelicidad y la fantasía popular no puede sufrir tal desengaño.

J. GARZÓN.

### Crónica

«Espero Kataluna, ha elegido la siguiente nueva Junta Directiva: Presidente, Miguel Cases; Vicepresidente, Carlos Urbez; Secretario, Enrique Ribera; Vice-secretario, José Astell; Cajero, Baldomero Anglada; Bibliotecario, Valentín Renom; Vocales, Srta. Clara Saltiri, Juan Berenguer y Claudio Bravo.

La «Sociedad Obrera Tradicionalista», «La Margarita», Salmerón 27, Gracia (Barcelona) ha fundado un «Grupo Esperanto Católico.»

En Gerona, se ha formado un grupo, bajo el nombre «Amor y Esperanza.» También se ha formado un grupo en La Arboleda (Bilbao.)

El grupo esperantista de S. Fernando (Cádiz) ha elegido la siguiente Junta Directiva: Presidente José Garzón Ruiz; Vicepresidente, Angel Gallego Jiménez, Secretario, José Diaz Coronado; Cajero, Manuel Soto Barranco; Vocales,



## Gazeto Andaluzia

nando (Kadiz) elektis la jenan Direktan Komitaton: Prezidanto, Jozefo Garzón Ruiz; Vic prezidanto, Angelo Gallego Jimenez; Sekretario, Jozefo Diaz Coronado; Kasisito, Manuelo Soto Barranco, Voĉdonantoj Santiago Franzon, Dominiko Muñoz kaj Arturo Duboy.

La Sociedad de la Dependencia Mercantil (Societo de la Komerca Komizaro) en Kadiz'ó, organizis Esperantan Grupon el siaj membroj, ĉe kiu S<sup>o</sup> Garzon faras Kurson de Esperanto. La nomita Grupo elektis la jenan Direktan Komitaton: Honoraj prezidantoj; Dr<sup>o</sup> L. L. Zamenhof, Rikardo Codorniu, Vincenjo Inglada kaj Jozefo Garzon; Aktiva prezidanto, Eduardo Gonzalez Escandon; Vic prezidanto, Rodrigo de la Peña Velez Bracho; Sekretario-bibliotekisto, Francisko Corrales Carrasco; Voĉdonantoj, Jozefo Caballero, Isidro Dorado Dorado, Rafaelo Pérez Escoto kaj Benito Berasuain. Ĝia nomo esperanta estas «Sudhispana Stelo» (S. S.)

En la Ĝenerala kaj teknika Instituto de Kadiz'ó, nia sentaciĝa samideano S<sup>o</sup> Garzon, faras dusemajnan kurson pri Esperanto, ĉe kiu kunvenas multe da lernantoj. Tiu ĉi estas grava paŝo al la enkonduko de Esperanto en la Oficialajn edukojn; pro kiu ni kore gratulas la nomitan andaluzian pioniron.

Santiago Franzón, Domingo Muñoz y Arturo Duboy.

La Sociedad de la Dependencia Mercantil en Cádiz, ha organizado un grupo esperantista, de entre sus mismos socios, en el cual el señor Garzón explica un curso de Esperanto. Dicho grupo ha elegido la siguiente Junta Directiva: Presidentes honorarios, Dr. L. L. Zamenhof, Ricardo Codorniu, Vicente Inglada y José Garzón; Presidente efectivo, Eduardo González Escandón; Vicepresidente, Rodrigo de la Peña Vélez-Bracho, Secretario-bibliotecario, Francisco Corrales Carrasco; Vocales, José Caballero, Isidro Dorado y Dorado, Rafael Pérez Escoto y Benito Berasuain. Su denominación esperanta es «Sud-hispana Stelo. (S. S.)

En el Instituto General y Técnico de Cádiz, nuestro infatigable compañero Sr. Garzón, explica un curso bisemanal de Esperanto, al cual concurren gran número de alumnos. Este es un importante paso hacia la introducción del Esperanto en los Centros oficiales de enseñanza, por el cual felicitamos cordialmente á dicho campeón andaluz.

### SPRITAJO

Dum bela printempa vespero, estis sidantaj, antaŭ la pordo de vinvendejo ĉe Kadiz'o, du amikoj; trinkante nian klasikan «Manzanillan» (pomodoran vinon). Unu el ili, Seviljano, kaj la alia naskiĝinta en la Sankta Maria kvartalo el Kadiz'o mem.

Post kiam ili longe babiladis, pri politiko kaj malsimilaj aferoj, ekstraktas pri nuntempaj el pensaĵoj; kaj la seviljano komencas klarigi al sia amiko la funkciadon de Kinematografo, Gramofono, kaj ceteraj ne konitaj de li, novaj aparatoj.

Fininte la seviljano sian klarigon, diris lin la kadizano: Mi tre bone komprenas ĝin: sed kio ne povas eniri en mian kapon estas tio, ke per unu metalfadeno, tiel longa kiel tiu de la telegrafo, estu sciigeble en unu (laŭ vi diras al mi), ĉio kion oni skribas en alia.

Estas tamen tre facila afero, respondas la seviljano: supozu tre longan hundon, havantan ĝian voston en Kadiz'o, kaj ĝian kapon en Madrido: Kadiz'o piedfrapas ĝin, kaj ĉe Madrido ĝi diras.... «haŭ».

### CHASCARRILLO

En una hermosa tarde de primavera, estaban sentados, ante la puerta de una taberna en Cádiz dos amigos, bebiendo nuestra clásica «Manzanilla» (vino de olor de manzana). Uno de ellos, sevillano y el otro nacido en el barrio de Santa María, de Cádiz mismo.

Después que charlaron largo tiempo, acerca de la política y distintos asuntos, comenzaron a tratar sobre los actuales inventos y el sevillano empezó a explicar a su amigo el funcionamiento del Cinematógrafo, Gramófono y demás nuevos aparatos desconocidos de él.

Habiendo terminado el sevillano su explicación, díjole el gaditano: Yo lo comprendo muy bien; pero lo que no puede entrar en mi cabeza es, que por un alambre tan largo como el del telégrafo, se pueda saber en un sitio (según tú me dices) todo lo que se escribe en otro.

Sin embargo, es muy sencillo responde el sevillano: suponte un perro muy largo, que tiene su cola en Cádiz y su cabeza en Madrid: Cádiz le dá un puntapié y en Madrid él dice .... ¡jau!

RODRIGO DE LA PEÑA.